

Eduard Ebel,
 Flustre falas la neg'
tradukita de Josef Kühnel

Flustre falas la neg'.
 Lag' rigidas laŭ leg'.
 Kristfeste brilas arbar'.
 Ĝoju pri Kristo, homar'!

Varma estas en kor'.
 Foras ĉiu dolor'.
 Fugas la vivoamar'.
 Ĝoju pri Kristo, homar'!

Sankta nokta lumbril'
 kaj ĉielo jubil'
 logas laŭ ĉarma fanfar':
 Ĝoju pri Kristo, homar'!

Eduard Ebel,
 Ŝvebas neg' el aer'
tradukita de Joachim Gießner

Švebas neg' el aer',
 nun ripozas la ter'.
 Mondo en brilblanka vest',
 ĝoju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor',
 for ĉagreno kaj plor',
 ĉesas de l' viv' la molest',
 ĝoju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l' glor'.
 Kaj el ĉielo la ĥor
 Sonos en dolĉa majest',
 Goju, ja venos kristfest'.

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 – †1905) en Esperanton de Josef Kühnel.*

MR-012-JK-1 / Arg-99-202 (2010-09-18 19:50:56)

MR-012-JK1

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 – †1905) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

MR-012-JG-1 / Arg-99-200 (2012-12-24 16:27:56)

MR-012-JG-1